

Claude Gacond kun Michel FRÉSARD:

La nuna UEA fakte naskiĝis en 1946

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.02.01

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-162/Radiokasedo-162-3-86-B-1010-Claude-GACOND-Michel-FRESARD-La-nuna-UEA-fakte-naskighis-en-1946.mp3>

Cl.- Parolas Claude GACOND kaj Michel FRESARD nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ ni revenu al nia studo pri la esperanto-vivo antaŭ 50 jaroj. La nuna Universala Esperanto-Asocio fakte naskiĝis ne en 1908, sed en 1946.

M.- Ĉu vi povus klarigi tion?

Cl.- Tre simpligite mi diru, ke de 1908 ĝis 1946 UEA grupigis individuajn membrojn. Paralele al ĝi ekzistis unue de 1905 ĝis 1922 la Internacia Centra Oficejo, kies sidejo troviĝis en Parizo. Laŭ la interkonsento de Helsinki subskribita en 1922 okaze de la 14-a Universala Kongreso, la teoria heredanto de la aktiveco de la Centra Oficejo estis nova komitato titolita Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj. Sed fakte, praktike kaj finance, UEA transprenis la tutan laboron. Tio kondukis ĝin al bankrota situacio. Kiam montriĝis en 1932, ke UEA ne povas plu elteni kaj subvencii tiun ĉi aktivecon, generalo Louis Bastien kaj Teo Jung lanĉis projekton de nova Universala Federacio Esperantista, kiu estus devinta anstataŭi UEA-n. Sed la postan jaron kadre de la 25-a Universala Kongreso, subskribiĝis la kompromisa Interkonsento de Kolonjo. UEA restis kaj principe fariĝis la tutmonda organizaĵo de la esperanta movado. Ekde tiam la naciaj societoj povis fariĝi kolektivaj membroj de UEA. Sed tuj okazis konfliktoj, ĉar la reorganizo de la esperanto-movado en Italio kaj Germanio celis la malebligon de senpera aliĝo al UEA. La koncernaj naciaj societoj volis havi monopolon tiurilate. Ili volis transformi UEA-an al simpla internacia ligo de naciaj esperanto-societoj, kion UEA mem ne povis akcepti. La 26-a Universala Kongreso, kiu disvolviĝis en 1934 en Stokholmo kaj donis voĉrajton al tiuj tendenculoj, vidis venki tiun ĉi vidpunkton per ne-reelekto de la ĝis tiamaj gvidantoj de UEA. La svisoj malfidis al la nova Komitato de UEA, kiu entenis la nazianon bankisto Anton Vogt kaj la faŝistan inĝenieron d-ro Rinaldo Orengo, tial ili rezistis per ĉiuj rimedoj eblaj al la translokigo de la Centra Oficejo de UEA al Londono. Pro tio generalo Louis Bastien, kiu ne volis reale kompromisi kun ili por trovi kontentigan solvon, fondis en 1936 la al UEA konkurencon Internacian Esperanto-Ligon. Post la dua mondmilito kunfandiĝos ambaŭ institucioj dank' al la repaciga interkonsento de Berno, kiu estis subskribita en 1946. Ĝi fakte realigis la projekton de 1933, kiun siatempe sabotis la nazie kaj faŝisme reorganizitaj germana kaj itala esperanto-asocioj. Dankal la kuniĝo de la diplomataj kvalitoj de Ivo Lapenna kaj Edmond Privat, Universala Esperanto-Asocio konkeros ekde la kvindekaj jaroj grandan prestiĝon kaj aŭtoritaton en sia efektiva funkcio de tutmonda organizaĵo de la esperanto-movado.

M.- La esperantistoj ne bone konas tiun ĉi disvolviĝon.

Cl.- Tial estas necese instrui tiun ĉi historion, sed unue oni devas ĝin atente trastudi. La esploroj de Ulrich Lins, Tazio Carlevaro kaj Ivo Lapenna, kiuj naskis la fundamentan verkon Esperanto en Perspektivo, estas bedaŭrinde iom supraĵaj kaj polemikaj. Ni havos la okazon konstati, ke la faktoj estas pli kompleksaj, ol kredigas la raportoj de tiu ĉi libro, kiu estas fakte la sola gvidilo por tiuj, kiuj ŝatus instrui la historion de la esperanto-movado.

M.- Tio montras, kiom enormas la tasko de la institucioj, kiuj provas organizi superajn kursojn de esperanto. Ne nur mankas instruistoj, sed ankaŭ la esplora fundamento. Tion ĉi ni bone konstatas en La Chaux-de-Fonds. La Internacia Fiera Altlernejo (IFA) de Kultura Centro Esperantista (KCE) ne povis ĝis nun organizi kursojn pri la historio de esperanto, ne pro manko de intereso flanke de la esperantistoj, sed pro manko de historiistoj.

Cl.- Mi esperas, ke dankal la materialo, kiu komencas amasiĝi en esperanto-dokumentejoj, nova generacio de esperanto-intelektuloj povos komenci trastudi la historion de esperanto. Sed estas grave, ke ili ne estu samtempe gvidantoj de gravaj organizaĵoj aŭ jam antaŭjuĝe orientitaj. Esploro estas malkovriga, nur se ĝi disvolviĝas en plena objektiveco.

M.- En atendo, ni provu jam malfermi la vojon al tiu ĉi esplorado per memkleriĝo.

Cl.- Kaj ni provu helpi ĉiujn, kiuj sentas tiun ĉi bezonon pli scii pri la disvolviĝo mem de esperanto. Tio estas la celo de niaj sabataj diskutoj. Memkleriĝante helpe de abunda dokumentaro, kiu troviĝas en la arkivejo Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), mi konstatis, ke ni devas malfidi ĉefe la epok-dividojn, kiujn proponas niaj historiistoj. La titolo Krizo kaj Degenero de UEA, kiun Ulrich Lins donis al ĉapitro dediĉita al UEA en la jaroj tridekaj komplete subjektivigis miajn serĉadojn dum pluraj jaroj, ĝis kiam mi konstatis, ke li senkonscie ripetis tion, kion li legis en polemikaj kontraŭ-UEA-artikoloj celintaj pravigi la vidpunktojn de la internaciistoj aŭ eĉ de la faŝistoj kaj nazianoj.

M.- Historiistoj devas kapabli distanciĝi de la trastudataj eventoj, kaj de ties aktoroj. Tio ne tre facilas en movado kiel la nia, kiu estas tiel malvasta, ke ni preskaŭ persone konas la plimulton el la aktoroj ĉu rekte, ĉu per la simpatioj aŭ kontraŭstaroj, kiujn ili vekis en la esperantistaro.

Cl.- Tial ni turnu niajn rigardojn al eventoj jam foraj en la tempo. Sed tuj nova problemo leviĝas. La manko de dokumentoj. Ni apartenas al pionira movado, kiun neglektis la publikaj arkivejoj. Aŭ pli ĝuste, la esperantistoj mem neglektis sendi siajn arkivaĵojn al konvenaj bibliotekoj, kiam ekzemple mortis organizaĵo, aŭ transdoniĝis tasko, emeritiĝis funkciulo. Tiel neripareble perdiĝis fundamentaj dokumentaroj. Gazetartikoloj kaj kelkaj raraj protokoloj, kiujn oni iom post iom malkovras, ne ĉiam sufiĉas por centprocente lumigi la esploratajn eventojn, Tial oni devas eviti ĉiajn tro rapidajn konkludojn.

M.- Niaj sabataj radio-elsendoj havas klerigan rolon. Ni volonte sendos la tekston de tiuj elsendoj al la interesatoj, kiuj ilin petos skribante al Svisa Radio Internacia.

Cl.- Claude GACOND kaj Michel FRESARD diras al vi : ĝis la venonta sabato!